

7-19479/29

(1960)

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



1

JANUARO 1960 * JARO XXIX

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov

Redakta komitato: Ivan Sarafov,
Stefka Hristova, Stefan Kiraĝiev,
Stefan Maserov, Simeon Simeo-
nov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por eksterlando — 16 levoj, 1,5
dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Tarifo por reklamoj: 4 levoj por 1 cm²;
korespondanoncoj — 1 levo por
ĉiu vorto; eksterlandanaj adreso-
j estas presataj senpage.

LA REDAKCIO akceptas ma-
terialojn por la koncerna nume-
ro de «Bulgara esperantisto»
ĝis la 12-a de la antaŭa monato.
Nur kiel ascepto gravaj aktua-
laj materialoj estos akceptataj
ĝis la 25-a de la antaŭa monato.

La aŭtoroj estas petataj skri-
bi tre klare, kun granda interli-
nia spaco kaj marĝeno. Manu-
skriptoj ne estas resendataj.

Ĉefartikolo. Bilanco kaj perspek- tivoj	1
Novaj societoj	3
Membroj-subtenantoj	3
Impona celebrado (A. Pânĉev — Kazanlâk, B. Mandeva — Sev- lievo, I. Dobrovski — St. Di- mitrov, K. Uzunova — Levski, B. Kolev — Ĥaskovo, G. Arna- udov — Rozino, Bankja, Iv. Stojanov — Loveĉ, Stara Za- gora, Levskigrad, A. Boja- ĝiev — Kolarovrad, G. Di- mov — Varna, A. Gaev — Ase- novgrad)	3
S.S. Zamenhofaj tagoj en Sofio	6
Junularo sur posteno (Ĥaskovo, An. Ĉalâkov — Burgas, L. La- lev — Trojan)	7
D. Dobrev. Al novaj sukcesoj, junularo	8
G. Dolapĉiev. Ni konstruos prop- ran Esperanto-domon	10
I. S. Pro Esperanto en la mal- liberejo	10
Tinka Lakova. La mondpaca es- perantista movado	11
Stefan Masârov. Necesa preci- zigo de kelkaj ofte uzataj fak- vortoj	12
Il. Petrov. Pri la korekta uzo de «da»	13
Rezultoj de la konkurso pri plej bonaj korespondantoj 1959	14
Pri SAT	14
Esperantaj nomoj en Bulgario	15
Bibliografio	15
Georgo Deŝkin. En la nova jaro (versaĵo)	15
Deziras korespondi	16

*Sur la kovrilo: la sofiaj esperanti-
stoj festenas okaze de la 100-a dat-
reveno de L. L. Zamenhof.*



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

BILANCO KAJ PERSPEKTIVOJ

1959 markis multajn sukcesojn por nia E-movado: brila internacia kongreso en Varsovio kun rimarkinda kaj impona partopreno de bulgaraj esperantistoj, konsiderinda plibonigo de nia gazeto «Bulgara esperantisto», plibonigo kaj plireguligo de la laboro de CK de BEA, konkero de novaj pli favoraj pozicioj en nia socio, pli bona utiligo de la bulgara gazetaro por nia propagando kaj por respegulo de nia organiza vivo kaj kultura agado. La okazintaj 8 regionaj konferencoj kontribuis por la organiza stabiligo de nia movado, por revigligo de iuj stagnantaj societoj. La decidoj de la dua plenkunsido de CK de BEA okazinta dum januaro de la pasinta jaro kaj la laŭplana laboro aperigis 20 novajn societojn, kio prezentas gravan organizan sukceson. Iuj societoj pligrandigis konsiderinde la nombron de siaj membroj (Dimitrovgrad, Pleven, Kazanlâk k. a.). Sed plej granda aktivigo en tutlanda skalo okazis ĉe la fino de la jaro per la celebrado de la 100-a datreveno de D-ro L. Zamenhof. Multaj societoj montris modelan agadon dum tiuj solenaj por la esperantistaro tagoj. Ili kontaktis kun la komitatoj de la Patrolanda fronto, de la paco, de bulgara-soveta amikeco, kun la kulturaj domoj, kluboj de kulturaj agantoj kaj aliaj kulturaj organizaĵoj. Tiel agis la societoj en Kazanlâk, St. Dimitrov, V. Rozino, Sofio («M. Gorkij»), Sevlievo, vilaĝo Bankja k. a. Tio plialtigis ne nur la aŭtoritaton de la lokaj societoj, sed ankaŭ de la E-movado ĝenerale. Rezulte de tio la pli granda parto de la jubileaj kunvenoj es-

tis plensukcesaj. Dum en la okcidentaj landoj 200-persona kunveno estas pritaksata kiel brila sukceso, ni havis en multaj lokoj 500 — 1000 ĉeestantojn (Kazanlâk, Sevlievo, Sofio, k. a.). Pli ol cent aŭskultantoj ĉeestis en vilaĝoj Bankja, Rozino, k. a.

Ĉio evidente montras, ke nia enlanda movado estas en supreniro. Tio povas ĝojigi nin kaj akceli al pli entuziasma laboro por novaj venkoj.

Sed ĝi ne devas kaŭzi kapturniĝon. Ĉar efektive en nia laboro estas ankoraŭ multaj mankoj.

Dum la pasinta jaro la asocio ne atingis eĉ la ciferon de la membrokotizo, ricevita dum 1958. Ni opinias, ke efektive la membraro pligrandiĝis, sed la societoj ne mobilizis sian aktivularon por enkasigo de la kotizo. Iuj societoj kvankam ricevis ĝin de siaj membroj, tamen ne pagas la kvoton al la asocio. Per tiaj agoj samideanoj, kiuj konsideras sin aktivuloj kaj fervoruloj fakte bremsas la evoluon de la E-movado. Multaj societaj estraroj ankoraŭ ne scipovas labori. La kasistoj ne havas helpan aktivularon. Iuj societoj ne estas dividitaj je grupoj por pli facila kaj pli regula kolektado de la membrokotizo kaj por plenumo de la organiza laboro. Pro tiuj kaŭzoj ankaŭ la nombro de la abonantoj al BE malpliigis dum la pasinta jaro. Ekzistas eĉ societaj estraroj, kiuj ne ricevis nian organon (Varna, Pleven, Kârĝali). Sed kiel ili gvidos la societojn neinformite! Ne mirinde, ke la societaj aferoj ne marŝas bone, ke la abonantoj malpliigas.

Ĉio ĉi montras, ke malgraŭ la atingitaj sukcesoj la organiza stato de la asocio ne estas sufiĉe bona, ĝi ne respondas al la favoraj cirkonstancoj kaj al la granda intereso al la internacia lingvo, kiun lastatempe oni montras en Bulgario. Sed pri tio kulpas ne nur la societaj estraroj. Pri ĝi influis ankaŭ la mankoj de la organiza fako ĉe CK de BEA kaj en la laboro de la asocia kancelario. La kontaktoj kaj la rilatoj inter la centro kaj la lokaj organizaĵoj devas plireguliĝi. La vivaj kontaktoj estis tre maloftaj. Estis mankoj ankaŭ en la gvidado de la organizita de CK konkurso kaj en la raportado de ties rezultoj.

Alia grava manko estas la malfruiĝo de BE. La redakcio jam regule, en la templimo, preparas kaj transdonas la materialojn al la presejo, kio malpliigis la malfruiĝon, sed la presejo ankoraŭ ne plenumas siajn devojn. La redakta komitato kaj antaŭ ĉio la ĉefredaktoro ne uzis ĉiujn eblajn rimedojn por ĝustigi kaj reguligi la aperadon. Sed la samideanoj el la tuta lando povas ankaŭ helpi sendante protestleterojn al presejo «G. Dimitrov», Ĉerni vrăh 2, Sofia.

Malgraŭ la atingitaj sukcesoj dum la Zamenhofa celebrado en niaj kontaktoj kun la ceteraj kulturaj kaj sociaj organizaĵoj, estas ankoraŭ societoj kiuj laboras memstare, izolate de la socia vivo de la urbo, oni ne scias pri ilia agado. Pro tia sektaneca sinteno suferas la societo en Ruse. Sed ne nur tie. Jam ĉiuj devas kompreni, ke la izoliteco ne nur ne povas alporti al ni sukceson, sed male, la homoj konsiderus nin stranguloj kaj nia movado ne havus aŭtoritaton. Fako «Ligoj kun kulturaj kaj sociaj organizaĵoj kaj internacia korespondado» lastatempe montris laŭdindan agadon. Dank' al ĝi la Centra konsilantaro de la sindikatoj kaj la Sofia urba komitato de la Patrolanda fronto dissendis instrukciojn al siaj organoj por fava subteno de la E-agado. Dank' al ĝi la asocio akiris tiun intiman kontakton kun multaj sociaj organizaĵoj. Sed ĝi ne instruciis tiurilate la ekstersoŝiajn societojn, ne publikigis en BE instrukcian artikolon.

Mankoj estas multaj en nia laboro. Sed ni povas limigi ilian danĝeran efikon, se ni

ĝustatempe ilin rimarkas kaj se ni mobilizas la fortojn de la tuta movado por ilia forigo. Ĝuste tian celon havis la okazinta en la fino de januaro tria plenkunsido de CK de BEA. Ĝi pridiskutis tiujn-ĉi mankojn kaj planis entreprenojn por ilia forigo. Sed ni sukcesos en tio nur se ĉiuj societoj, ĉiuj samideanoj mobilizos siajn fortojn, sian volon por la plenumo de la decidoj (ilin ni publikigos en la februara numero).

Ni devas instigi la kritikon kaj eduki niajn membrojn esti sinkritikemaj, atenti al la kritiko kaj korekti siajn erarojn. Ni devas obstine batali kontraŭ la ofendiĝemo pro kritiko, ne montri favoron al tiuj samideanoj, kiuj ne akceptas la kritikon, per la fajro de la kritiko purigi la vojon de nia movado supren.

Ni devas utiligi la enkondukon de la membrokarto por stabiligo de nia organiza stato. La societoj ellaboru precizajn kaj konstantajn nomarojn de la membraro kun la numeroj de la membrokarto. Pro tio kolektante la membrokotizon por la unua trimonato ili kolektu ankaŭ po 1 levon por membrokarto kaj tuj sendu al CK kune kun la membrokotizo ankaŭ la ĝustajn nomojn de la pagintaj samideanoj, por ke ili tuj ricevu la membrokartojn. Ili ne estos nur formalajo, destinita por amatoroj. La membrokarto estas grava dokumento atestanta pri fideleco al nia movado, pri regula membreco. Ĝin ni postulos ĉe aliĝo al la kongresoj, ĉe turismaj interŝanĝoj kaj ĉe aliaj asociaj aranĝoj. Petante pri la servo la asocion ĉiu devos skribi la numeron de sia membrokarto.

Neniam en nia lando estis tiel bonfavoraj la kondiĉoj por nia movado. La rezultoj nun dependos de ni mem, de nia idealismo, fervoro, laboremo. Ni montru al nia socio kaj al la tuta mondo, ke ni posedas tiujn kvalitojn. Ni glorigu nian karan Patrolandon per nia modela kaj abnegacia agado!

Samideanoj, afranku viajn leterojn por viaj alilandaj korespondantoj per jubilea Zamenhof-poŝtmarko, sed ne forgesu alglui ankaŭ la brikmarkon por la Esperanto-domo!

Novaj societoj fonditaj dum 1959 — Zamenhofa jaro

16. Urbo Preslav, societo «D-ro L. L. Zamenhof» (fondita dum julio) kun 9 membroj.
17. Urbo Dimitrovgrad, societo «Flamo» (en Kemia uzino «Stalin», dua societo en la urbo, fondita la 12-an de novembro 1959) kun 30 membroj.
18. Urbo Pomorie, societo «Trifon Hristovski» (fondita la 27-an de oktobro) kun 15 membroj.
19. Vilaĝo Batak, distr. de Pazarĝik (fondita la 26-an de decembro) kun 22 membroj.
20. Vilaĝo Gabarevo, distr. de Stara Zagora, societo «D-ro L. L. Zamenhof» (fondita la 27-an de decembro) kun 6 membroj.

MEMBROJ SUBTENANTOJ

1960

1. Boris Angelkov — v. Buĉin prohod, Sofia distr.
2. Ivan Stojanov Kolarov — Sofio
3. Violin Oljanov — Sofio
4. Berta Marinova — Sofio

1959

19. Nadejda Rajĉeva — Kolarovgrad
20. Rajna Kasabova — Kolarovgrad
21. Nikolaj Pârvanov — Kolarovgrad
22. Kiril Bogutinski — Sofio

NOVA SOCIETO

P o m o r i e. Dek kvin geesperantistoj el urbo Pomorie fondis la 27-an de oktobro novan Esperanto-societon «Trifon Hristovski». La fondkunveno elektis prezidanto s-anon St. Miĥajlov kaj sekretario — s-anon B. Ovĉarov.

La redakcio gratulas la samideanojn el Pomorie kaj bondeziras al ili daŭran prosperantan vivon de ilia societo.

I M P O N A C E L E B R A D O

K a z a n l â k. Imponan kaj neforgeseblan celebradon okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto — D-ro L. L. Zamenhof, organizis je la 15-a de decembro la E-societo «Roza valo» en Kazanlâk. En la salono de la popola lernejo «Iskra» kolektiĝis pli ol 500 geurbanoj.

Orkestro plenumis la himnon esperantan — «La espero». Brilan prelegon pri la vivo kaj agado de la homamanta kreinto de la internacia lingvo faris k-do K. Drajev, membro de CK de BEA. La preleganto skizis ankaŭ la plej grandajn sukcesojn de Esperanto en la lasta tempo je monda skalo. La prelego de k-do Drajev estis aŭskultata kun profunda atento kaj ofte interrompata pro la granda

emociiĝo de la publiko kaj ĝiaj ŝtormaj aplaŭdoj.

La prezidanto de la societo D. Martinov sciigis pri la decido de la Urba popola konsilantaro pri nomigo de unu strato en la urbo je la nomo «Esperanto». Tondra aplaŭdo aprobis tiun sciigon.

Fine estis plenumita varia arta literatura kaj muzika programo.

A. Pânĉev

S e v l i e v o. La sevlievanoj-esperantistoj kune kun la komitato por la paco kaj la patrolanda fronto aranĝis solenan vesperon je 17-a de decembro 1959 okaze de la 100-a datreveno de Zamenhof. La salono de la

teatro estis plenplena. Ĉeestis ĉirkaŭ 1000 personoj. La prezidanto de la societo Ivan Georgiev faris prelegon «D-ro L. L. Zamenhof — aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto». Estis plenumita literatura-muzika programo. Faris impreson la dueto «Kanto de vaganto» kantita esperantlingve. Kun aplaŭdoj la ĉeestantoj akceptis la anoncon de la urba konsilantaro pri nomigo de strato je la nomo de Zamenhof. La kunveno sendis telegramojn al UEA, BEA, BKP, Nacia komitato por la paco k. a.

La loĝantaro de urbo Sevlievo montris viglan intereson al la granda homama ideo de Zamenhof por la paco kaj amikeco inter la popoloj.

Bonka Mandeva

Stanke Dimitrov. Okaze de la centjaro de la naskiĝo de nia majstro D-ro L. L. Zamenhof nia societo «Marek» aranĝis ekspozicion-vitrinon de esperantaj libroj, gazetoj, ĵurnaloj, fotoj, leteroj k. a. Per presitaj afiŝoj en la nomo de la patrolanda fronto, la komitato de la paco kaj E-societo kiuj estis disgluitaj en la urbo ni sciigis pri la solena kunveno. La laŭtparolilo de la urbo disaŭdigis malgrandan raporteton pri Esperanto kaj sciigis ankaŭ pri la solena kunveno. Ankaŭ la anoj de la societo faris perbuŝan propagandon. La 11-an de decembro je la sepa horo la salono de la popola armeo estis jam plena. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de la patrolanda fronto k-do Radev kaj la prezidanto de la komitato por defendo de la paco k-do Izmirlijev. Pri la vivo kaj agado de D-ro L. Zamenhof raportis la prezidanto de s-to «Marek» Boris Drenski, membro de CK de BEA. Estis plenumita bona arta programo en Esperanto kaj en bulgara lingvo.

La kunveno sendis telegramojn al CK de BKP kaj al CK de BEA.

Iv. Dobrovski

Levski. La 17-an de decembro en la salono de la gimnazio okazis solena kunveno okaze de la centjara datreveno de la naskiĝtago de aŭtoro de Esperanto — D-ro Zamenhof. Konvenan raporton faris s-ano D. Dimitrov. En la literatura programo partoprenis s-anoj D. Dimitrov, D-ro Belĉev ka.

Dum la sama kunveno St. Koev, vizitinto de la 44-a UK de Esperanto en Varsovio rakontis siajn impresojn.

K. Uzunova

Ĥaskovo. La loka E-societo «As. Zlatarov» organizis konvenan festadon de D-ro L. L. Zamenhof okaze de lia centjara datreveno. Estis aranĝitaj vitrino kaj propagandaj fototabeloj.

La 13-an de decembro laŭ iniciato de la junulara grupo okazis kamarada amuzvespero. Pri la verko de D-ro L. L. Zamenhof parolis inĝ. St. Stojĉev. Delĉo Ĥaralanov — malnova esperantisto-pioniro rakontis memoraĵojn pri la esperantista movado en la urbo antaŭ la milito. Tiam la societo estis rifuĝejo de la progresemaĵoj junuloj persekutitaj de la tiama faŝista reĝimo. Li faris alvokon al la ĉeestantoj ellerni Esperanton por havi eblecon senpere kontakti kun gejunuloj sur la tuta terglobo. La recititaj versaĵoj faris grandan impreson al la ĉeestantoj gastoj.

La 18-an de decembro okazis la publika urba kunveno en kiu parolis la speciale alveninta el Sofio membro de CK de EEA — K. Drajev. La geesperantistoj plenumis literaturan kaj muzikan programon.

La loka radio-centro disaŭdigis specialan programon pri D-ro Zamenhof kaj la esperantista movado en la mondo.

B. Kolev

Vil. Rozino. La 21-an de decembro laŭ iniciato de la loka komitato de la Patrolanda fronto, de la popola legejo kaj la E-societo «Stelo de l'paco» en la vilaĝa kinosalono estis organizita solena kunveno. Emociigan festparoladon faris K. Drajev, membro de CK de BEA alveninta speciale por la festo. Liaj lastaj vortoj estis akceptitaj kun tondraj aplaŭdoj.

Dum la sama kunveno oni decidis pri la fondo de nova kurso por komencantoj laŭ la direkta metodo.

G. Arnaudov

Vil. Bankja. La 4-an de januaro la loka E-societo «Solidareco» aranĝis solenan kinomatenon por solenhonori la centjaran datrevenon de la naskiĝo de nia majstro D-ro L. L. Zamenhof. Parolis K. Drajev. Sekvis arta programo. La societa sekretario Dora Ĥristova sciigis pri la decido de la komunuma konsilantaro nomi straton en la kuracloko «Bankja» **E s p e r a n t o.**

Loveĉ. La 15-an de decembro la loka E-societo «Espero» organizis solenan Zamenhofan kunvenon kun varia programo. Mandolina orkestro plenumis la himnon «La espero». La raporto pri la vivo de Zamenhof kaj la 44-a UK en Varsovio faris k-do Iv. Stojanov. Oni deklamis versaĵojn kaj legis rakontojn en Esperanto.

Ni preparas estonte konstantan ekspozicion en du montrofenestroj en la centro de la urbo. Nia societo plenumis la kontrolan ci-

feron pri 25 societanoj en 1959 j. kaj kolektis 30 abonantojn por la asocia organo «Bulgara esperantisto».

Iv. Stojanov

Stara Zagora. La E-societo «M. Gorkij», la Urba komitato por defendo de la paco kaj la Kultura domo organizis je la 17-a de decembro publikan festadon de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Ĉeestis oficialaj reprezentantoj, de la supremenciitaj organizaĵoj, de Radio St. Zagora, ĵurnalistoj, direktoroj kaj instruistoj de mezgradaj lernejoj, geurbanoj kaj multaj esperantistoj. Omaĝe al Zamenhof parolis s-ano Kiril Drajev, membro de CK de BEA. Oni plenumis artan programon. En la «Ĝardeno kvartalo» de Stara Zagora iu el la stratoj estas rebaptita je la nomo de nia Majstro kaj la aŭtobushaltejo proksime al la distrikta hospitalo ricevis la nomon «Esperanto».

Levskigrad. Komitato konsistanta el reprezentantoj de la Esp. societo «Vasil Levski», de la Patrolanda fronto kaj de la loka kultura domo organizis je la 20-a de decembro solenan celebron de Zamenhof okaze de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo. Prelegis pri Zamenhof s-ano Kiril Drajev komisiito de CK de BEA. Post la kunveno sekvis arta programo, muziko kaj dancoj, daŭrintaj ĝis malfrua vespero.

Kolarovgrad. Je la 14. XII vespere la E-societo «VEKIĜO» organizis celebradon okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de la genio homara d-ro L. L. Zamenhof.

Prelegis la prezidanto de la societo Atanas Bojaĝiev pri la vivo, la ideo kaj la verko de d-ro L. L. Zamenhof.

Dum 30-35 minutoj la lektoro rakontis pri la historia kaj humana afero de Zamenhof, kiu vivas kaj vivos eterne en la panteono de la senmortuloj.

Poste rakontis pri la laboro de MEM en la kadro de la 44-a kongreso N. Pârvanov, kiu estis delegito de la kongreso. Li estas elektita en la estraro de MEM kun s-ino Tinka Lakova el Sofio.

S-ino N. Rajčeva rakontis pri la ekskursoj organizitaj dum la 44-a kongreso.

Parolis ankaŭ s-ino Cvetko Todorov, junulo kiu partoprenis la konferencon de TEJO en Gdansk — Pollando.

La ĉeestantoj de la celebrado restis tre kontentaj pri la programo kaj pri la ekspozicio de libroj, ĵurnaloj, ilustraĵoj, poŝtkartoj, revuoj ktp. kiu estis aranĝita en la sama salono de la Patrolanda fronto.

Matene je la sama tago estis aranĝita 25 minuta radio-programo — kun parolado pri Zamenhof, estis plenumita «La vojo», «Letero» de Vapcarov, kanto — «Ruĝaj papavoj» kaj malgranda teatraĵo — «Okazintaĵo en la kupeo». Partoprenis Georgi Marev, Ĥristo Tonev, Ĉanko Karaspasov, Rajna Kasabova kaj Atanas Bojaĝiev.

La vekiĝanoj bonege celebris sian karan d-ron L. L. Zamenhof — la aŭtoro de Esperanto, la inventinto de la ŝlosilo, per kiu oni malfermas ne nur la fenestron al la mondo, sed eĉ la korojn de l'homoj el ĉiuj partoj de la terĝlobo.

Atanas Bojaĝiev

Varna. La 16-an de decembro, en la granda festa aŭditorio 215 en la universitato de Varna la loka Esperanto-societo «Albatro» kune kun la urba komitato por defendo de la paco celebris la genian aŭtoron de la internacia lingvo Esperanto D-ro L. L. Zamenhof. Festan paroladon faris nia senlaca Esperanto-pioniro s-ino Zora Mladenova Hans. Poste s-ano Georgi Dimov rakontis impresojn de la glora 44-a Universala kongreso okazinta ĉi somere en Varsovio. Sekvis recitaĵoj kaj deklamaĵoj el la nevelka originala esperanta literaturo. La saman vesperon la loka radio-centro raportis pri ĉi tiu paca solenaĵo.

La 15-an de decembro Radio Varna dissendis duonhoran varian programon dediĉitan al D-ro Zamenhof. En la programo partoprenis anoj de la junulara sekcio «Verda lumturo» ĉe Esperanto-societo «Albatro»

G. Dimov

Asenovgrad. Dum la kuranta jaro la progresema kaj pacamanta homaro kun profunda estimo kaj senfina dankemo festas la karan centjaron de la naskiĝo de la granda pacamanto kaj geniulo, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto — D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Same kiel ĉie en la tuta mondo ankaŭ la esperantistoj de Asenovgrad ne postrestis.

Grandan preparon faris la estraro antaŭ la difinita tago. Per la entuziasmoplena helpo de la kursanoj ĝi vere sukcesis renkonti la solenan daton preta.

Dimanĉe la 13-an de decembro la klubejo estis jam bone ornamita per sloganoj, portretoj, murgazetoj kaj aliaj. Baldaŭ la salono pleniĝis. Ĉeestis novaj kaj malnovaj gesamideanoj. Ne mankis ankaŭ gastoj.

Post la malfermo de la kunveno la prezidanto de la s-to Jordan Točev donis la parolon al Atanas Gaev, kiu faris bonan raporton pri la vivo kaj la agado de nia maj-

stro. Li emfazis la meriton de D-ro Zamenhof al la homaro kaj speciale al la simplaj homoj, kreante la facillerneblan internacian lingvon — Esperanto, kiu malfermas fenestron por ili al la tuta mondo. Esperanto, li diris, dum sia 72-jara ekzistado atingis konsiderindajn sukcesojn. La esperantistoj de nia lando per sia korespondo honeste kaj senbrue konigas al la mondo pri la atingajoj en nia socialisma lando kaj pri multaj aliaj aferoj.

Post la raporto sekvis programo de deklamaĵoj, kantoj, humorajoj kaj muzikaĵoj. Preskaŭ ĉiuj programeroj estis prezentataj de la novaj kursanoj. La tuta programo estis bonege plenumita kaj ĉiujn

ege kontentigis. Post la kunveno iuj el la ĉeestantaj esperantistoj kaj gastoj per manpremo al la prezidanto esprimis sian grandan kontentecon kaj dankon pri la belega programo.

Malbonan impreson faris tamen la foresto de iuj malnovaj samideanoj, kiuj en la pasinteco laboris longajn jarojn fervore por nia kara afero. Certe per ilia ĉeesto la entuziasmo kaj kuraĝigo al la agema estraro, kaj la novuloj estus pli granda.

Do tempo jam estas, ke niaj karaj malnovaj kaj agemaj gesamideanoj, niaj iamaj inspirantoj donu siajn fortojn almenaŭ dum tiaj solenaj aranĝoj.

Atanas Gaev

ZAMENHOFĴ TAGOJ EN SOFIO

Kiel en ĉiuj lokoj de l'vasta Esperantio ankaŭ la bulgara esperantistaro solene festis la centjaran datrevenon de la naskiĝtago de nia majstro. Aparte ampleksaj estis la solenajoj en la ĉefurbo.

Lunde, la 14-an de decembro en la salono de la klubo de la kulturaj agantoj la urba komitato de la Patrolanda fronto, la urba komitato por defendo de la paco, la CK de Bulgara esperantista asocio kaj la Pola kultura centro en Sofio organizis solenan kunvenon. Ĉeestis pli ol 600 geesperantistoj kaj gastoj. Malfermis la kunvenon la prezidanto de la Zamenhofa komitato ĉe CK de BEA Violin Oljanov, kiu donis la parolon al Nikola Aleksiev — sekretario de la Centra konsilantaro de la profesiaj unuiĝoj. Li skizis la ĉefajn faktojn el la biografio de D-ro L. L. Zamenhof — la genia kreinto de la internacia lingvo kaj substrekis la rolon, kiun lia verko ludis, ludas kaj en la estonto ludos por la paca kunvivado kaj interkompreno de la popoloj. Specialan atenton la raportanto dediĉis al la taskoj de la bulgaraj esperantistoj por la propagando de la sukcesoj de nia popolo survoje al la socialismo. Per multaj ekzemploj li ilustris kiel la internacia korespondado de la bulgaraj esperantistoj povas esti tre utila por la disvastigo de la vero por la politika situacio en nia lando, por la paca laboro de nia popolo.

En la belarta programo partoprenis multaj esperantistoj, artistoj el teatro «Trudov front» kaj la danca trupo de kulturdomo «Levski».

Dum la sama kunveno kamarado G. Dolapĉiev — prezidanto de la Konstrua komitato

por Esperanto-domo en Sofio per entuziasmigaj vortoj anoncis la malfermon de la kampanjo por kolekto de mono por tiu grava iniciato.

Tuj estis deklaritaj promesoj por disvendado de markoj-brikoj por po pli ol mil levoĵ fare de apartaj personoj. La kunveno akceptis telegramojn sendotajn al CK de BKP, al la Nacia konsilantaro por defendo de la paco kaj al UEA.





La centra gazetaro en la ĉefurbo bone respegulis la Zamenhofaj tagoj. Estis publikigitaj biografiaj notoj pri Zamenhof kaj faktoj pri la internacia lingvo en la ĵurnaloj: «Rabotniĉesko delo», «Trud», «Oteĉestven front», «Veĉerni novini» kaj Stârşel». La partia organo «Rabotniĉesko delo» sciigis ankaŭ pri la solena kunveno de la sofiaj esperantistoj. Radio Sofio ankaŭ disaŭdigis konvenajn materialojn.

Laŭ decido de la urba konsilantaro unu strato en la ĉefurba kvartalo «Levski» portos la nomon de D-ro L. L. Zamenhof.

La poŝtdirekcio eldonis novan poŝtmarkon, verdkoloran, kun portreto de Zamenhof kaj surskribo 1859—1959 — Zamenhof — aŭtoro de Esperanto. Por unua fojo ĝi estis ven-

data al la esperantistoj ĉeestantaj la solenan kunvenon.

La 15-an de decembro en la salonoj de restoracio «Bulgario», pli ol cent geesperantistoj denove kolektiĝis por festi la 100-jaran datrevenon en pli intima kaj gaja atmosfero. Ne mankis tostoj, dancoj kaj esperantaj kantoj.

Jaude, la 17-an de decembro 1959, solenan vesperon organizis ankaŭ la poŝtistoj-esperantistoj. La ĉeestantoj ĝuis artan programon kaj vidis kelkajn interesajn filmojn.

Kvankam kun ioma malfruiĝo aperis jubilea gazeto «100 jaroj — Zamenhof».

Ĉiuj ĉi aranĝoj faris bonegan propagandon por Esperanto.



S. S.



Junularo sur posteno

Ĥaskovo. Dum novembro en nia urbo estis fondita junulara Esperanto-grupo ĉe la loka societo. Nun la grupo konsistas el 4 membroj. Espereble la membraro de la grupo baldaŭ kreskos, ĉar en la novaj kursoj partoprenas precipe gejunuloj. Tre grave estas ke en la kursoj lernas la internacian lingvon ankaŭ oficistoj kaj aktivuloj de la urba komitato de la Komsomolo.

Burgas. La junulara grupo ĉe urba E-societo «Nigra maro» agas bone por disvastigo de Esperanto kaj havas jam interesan organizan vivon.

La junuloj ofte okazigas kulturklerigajn kunvenojn je tre variaj temoj. Preskaŭ ĉiu-

sabate la gegrupanoj ekskursas kune al la interesaj ĉirkauaĵoj de la urbo. Estis organizitaj ankaŭ kelkaj esperantistaj vesperoj en la konata marista «Interklubo». Dank'al la konvenaj programoj ili bone efikis.

Multo estas farebla por la lingva perfektigo de la geesperantistoj kiu ankoraŭ ne estas brila. Grava manko en la laboro estas la nesufiĉaj ligoj kaj kontakto kun la loka komitato de la Komsomolo. Estas necese ankaŭ pligrandigi la nombron de la abonantoj al la revuoj «Bulgara esperantisto» kaj «Nuntempa Bulgario».

An. Ĉalâkov

Trojan. La esperantista societo «Balkana stelo» organizis lastatempe novajn kur-

sojn por komencantoj. Jam funkcias kurso por civitanoj kun pli ol 20 gepartoprenantoj kaj 17-persona kurso ĉe la ŝtata uzino «Elprom». Ni intencas ĝis la fino de januaro organizi prelegon kaj ekspozicion en la uzino «Elprom» por ekinteresi la tutan laboristaron (en la uzino laboras pli ol 1200 ge-laboristoj) pri la internacia lingvo kaj orga-

nizi tie novajn kursojn.

Por la bona efektivigo de la ekspozicio ni petas la helpon de ĉiuj esperantistoj, kiuj deziras disponigi al ni konvenan materialon kaj bildkartojn al la adreso: Esperantista kurso ĉe «Elprom» — Trojan, Bulgario.

L. Lalev

AL NOVAJ SUKCESOJ, JUNULARO!

Pasis jam 1959. Dum tiu ĉi jaro la junularaj grupoj en la lando atingis gravajn sukcesojn en la organizado de la junaj geesperantistoj kaj por disvastigo de Esperanto inter la junularo.

En ĉefartikolo en la 8-a numero 1958 de «Bulgara esperantisto» estis starigitaj la ĉefaj taskoj de la junaj esperantistoj. De tiam pasis jaro kaj duono. Dum tiu ĉi tempo fondiĝis novaj junularaj grupoj en la kadroj de la Esperanto-societoj, ekzemple en la urboj Tolbuĥin, Ĥaskovo k. a. Bedaŭrinde en la grandaj urboj kiel Stara Zagora, Kolarovgrad, Jambol, Dimitrovo, Blagoevrad k. a. ne estas fonditaj junularaj grupoj malgraŭ ke en ĉi tiuj urboj ekzistas pli ol 5 — 10 gejunuloj — membroj de la lokaj societoj.

Iuj societoj ne laboras inter la gejunuloj, ne helpas ilin, ne organizas kursojn en oficejoj, uzinoj, entreprenoj kaj lernejoj — lokoj, kie estas amasiĝintaj multe da gejunuloj, ne altiras junajn geesperantistojn, membrojn de siaj societoj, al aktiva laboro, kaj ĉiam nur konstatas, ke la societa membraro ne kreskas kaj konsistas nur el maljunuloj.

La junularaj grupoj sendepende de sia partopreno en la societaj kunvenoj devas aranĝadi proprajn junularajn kunvenojn, en kiuj prelegas kaj parolas nur gejunuloj — membroj de la grupo. Tio unuflanke organizas la gejunulojn, aliflanke plialtigas ties aktivecon kaj parolnivelon. Bonan ekzemplon tiurilate elmontras la junularaj grupoj en Sofio, Plovdiv, Ruse, Burgas k. a. En tiuj kunvenoj post la prelegoj kaj diskutoj sekvas: ĵurnalo parolata, lingvaj demandoj, pristudo de kantoj, novaĵoj el la tuta mondo kaj dancoj kun interparoloj en Esperanto. La junulara grupo en Plovdiv organizas kunvenojn trifoje posemajne.

La organizado de ekskursoj, kolektivaj vizitoj de kinejoj, teatroj entuziasmigas la gejunulojn kaj altiras al la junularaj grupoj novajn membrojn kaj amikojn. Tiuj iniciatoj estas ege utilaj, se la estraroj de la grupoj bone organizas ilin.

Sed plenumante siajn specialajn taskojn la junularaj grupoj ne devas forgesi, ke ili

estas nedisigebla parto de la unuecaj Esperanto-societoj kaj ili devas partopreni vigle en ties ĝenerala laboro. Organizaĵoj, en kies vivo ne partoprenas gejunuloj, estas anemiamaj, malviglaj. Ni ne devas prisilenti la riproĉindan konduton de la Sofia junulara grupo, kiu neglektas la societan laboron, kaj la komunajn entreprenojn. En la unuamaja manifestacio en kiu la sofiaj esperantistoj prezentas al la civitanoj sian organizitecon kaj propagandas nian aferon, ne estis troveblaj gejunuloj pri portado de la sloganoj kaj de la portreto de Zamenhof. Same okazis en la preparo de la solena jubilea kunveno dum decembro. Ili absolute per nenio helpis en la grandega kaj streĉa laboro. Ne hazarde iuj civitanoj, vizitintaj tiun kunvenon kaj unuan fojon venintaj al ni, esprimis sian impreson, ke la granda salono estis plennigita nur de plenaĝuloj kaj maljunuloj. La neagemo de la junulara grupo donis tiun malbonan rezulton.

La gejunuloj devas enverŝi siajn fortojn en la societojn kaj tiamaniere plivigligi kaj variigi ties vivon.

La organizado de kursoj por gejunuloj devas esti tasko de la loka junulara grupo, kiel fidela helpanto de la societo. Gravan atenton tiurilate la grupoj devas turni al la superaj kaj mezaj lernejoj, al uzinoj kaj fabrikoj, kie laboras multaj gejunuloj. Imitinda estas la ekzemplo de la junulara grupo en Ruse. Ĝi sukcesis organizi kursojn preskaŭ en ĉiu mezlernejo kaj la kursojn gvidas nur gejunuloj — membroj de la grupo. Ses membroj de la junulara grupo en Pazarĝik ankaŭ gvidas Esperanto-kursojn.

La ligoj de la junularaj grupoj kun la komsomolaj organizaĵoj devas esti ĉiam fortaj. La grupoj devas laŭplane aranĝadi entreprenojn kune kun Komsomolo — organizado de Esperanto-kursoj, de komunaj kunvenoj, kunsidoj, de amuzvesperoj ktp. Tiurilate bone laboras la junulara grupo en Ruse. Ĝi konsultis la fakon «Klerigo kaj kulturo» ĉe la distrikta popola konsilantaro kaj la urban komitaton de Komsomolo en Ruse pri organizado de Esperanto-kursoj en la mezler-

nejoj. Tiuj ĉi instancoj respondis jese kaj rekomendis al la gelernantaj komitatoj en la urbo la organizadon de Esperanto-kursoj en ĉiuj mezlernejoj. Nome dank'al tiuj bonaj ligoj kun Komsomolo, en Ruse nun funkcias tiom multe da kursoj por gelernantoj. La junulara grupo en Pazarĝik kun helpo de la Komsomolo organizis dum la somero gelernantan brigadon, kiu laboris por riparado de la lernejo. La ekonomia efekto de la laboro de la brigado estas 32 000 levoj.

Dum la manifestacioj je la 9-a de septembro, je la 1-a de majo aŭ je la 24-a de majo (laŭ la loka praktiko) la junaj geesperantistoj devas aktive partopreni. Vestante sin per kostumoj de diversaj nacioj, portante portretojn, sloganojn kaj aliajn esperantajn propagandilojn. Tio tre efike influas al la neesperantista publiko. Bone prezentis sin ekzemple, la gelernanta grupo en Pomorie dum la unuamaja manifestacio.

La eldonado de murgazetoj, foto- kaj leter-tabuloj, la aranĝado de ekspozicietoj kaj montrokestoj tre efikas ne nur al la junaj

geesperantistoj, sed ankaŭ al la neesperantista publiko. Se tiuj propagandaj materialoj estas bone preparitaj kaj estas belaspektaj ili altiras la atenton kaj interesigas pri Esperanto. Post nelonge multaj el la vidintoj de tiuj materialoj jam demandas pri malfermotaj kursoj. Tiun taskon ne ĉiuj junularaj grupoj bone plenumas.

Konklude la junularaj grupoj devas esti la unuaj kaj la plej aktivaj helpantoj de la societaj estraroj en ĉiuj societaj entreprenoj. La junuloj mem devas proponi sian helpon. La societaj estraroj devas ankaŭ serĉi la gejunulojn kaj prizorgi pri ties spertiĝo en la lingvo kaj en la organiza laboro. Se ne estas forĝataj esperantistaj gvidantoj en la medio de la junularo ni ne povos havi bonajn perspektivojn por la disvolviĝo de nia movado. Organizaĵo sen junularo anemias kaj finfine mortas. Pro tio ĉiuj societoj devas direkti sian atenton al tiu gravega sektoro de nia laboro.

D. Dobrev

gvidanto de la junulara fako de BEA

NI KONSTRUOS PROPRAN ESPERANTO-DOMON

La bulgara Esperanto-movado senĉese disvolviĝas. De jaro al jaro kreskas la nombro de la lokaj Esperanto-societoj kaj grupoj en urboj kaj vilaĝoj, en fabrikoj kaj oficejoj.

La movado postulas jam havi sian kulturan centron, propran domon, en kiu koncentriĝos la tuta ĝia agado. Malnova revo de la bulgara esperantistaro estas havi sian propran Esperanto-domon en Sofio. Kaj jen, la nuna Estraro de la Centra komitato de Bulgara esperantista asocio iniciatis eldoni multkoloran glumarkon, «Briko por Esperanto-domo en Sofio» per kiu oni kolektos monrimedojn por konstrui la domon.

La elektita de CK de BEA Konstrukomitato ekagis obstine kaj sindone. Ĝi faros ĉion eblan por realigi la malnovan kaj nunan revon de la bulgara esperantistaro, organizante la kolektadon de la monrimedoj kaj prizorgante ĉiujn aferojn ligitajn kun la planado kaj la konstruo mem de la domo, ĝis ĝia ekfunkcio.

La 14-an de decembro 1959 dum la sole-na publika kunveno omaĝe al D-ro L. L. Zamenhof en Sofio, la konstrukomitato proklamis la kampanjon por la vendado de la glumarko «Briko por Eesperanto-domo en So-

fio» malfermita kaj jam tuj en la kunveno enskribiĝis kelkaj samideanoj, kiuj deklaris, ke ili akceptas vendi markojn-brikojn kaj kolekti po mil, mil ducent kaj pli da levoj por la fonduso.

Oni distribuis kaj sendis al ĉiuj enlandaj Esperanto-societoj difinitan nombron de la glumarko-briko je ĝenerala sumo da proksimume 350,000 levoj, kiu sumo garantias la konstruon de konsiderinde granda kaj reprezenta Esperanto-domo en Sofio — fiero por la bulgara esperantistaro, por nia movado, por nia lando kaj popolo.

Nia popolo kun ĝojo kaj sindonemo laboras kun streĉitaj fortoj plenumi la grandiozan programon de nia kara Bulgara komunistarta partio por efektivigo de akcelita ekonomia evoluo de nia socialisma Patrio. La bulgaraj esperantistoj aktive partoprenas tiun ĉi noblan streĉan laboron, ĉiu ĉe sia laborposteno, ĉe sia laborloko, per siaj eblecoj. Estante idealistoj ili ĉiam taksis la interesojn kaj la bezonojn de nia socialisma socio, de la popolo pli alte ol siajn proprajn interesojn. Pro tio ni estas certaj, ke la bulgara esperantistaro kun klara konscio kaj sindonemo klopodos kolekti maksimuman sumon per la glumarko--briko, por esti kon-

struota la kultura kaj organiza centro de la bulgara Esperanto-movado — la Esperanto-domo en Sofio. En ĝin estos enkonstruita kaj enmasonita la entuziasmo kaj la idealismo de la patriota bulgara esperantistaro.

Konsiderante la entuziasmon kaj la idealismon de nia tutlanda samideanaro, ni estas certaj, ke jam en 1960 oni komencos la preparon de la projekto-planoj kaj en 1961 oni komencos la konstruadon mem.

La laboro por kolektado de la monrimedoj per vendado de la glumarko-briko, jam mobilizas la esperantistajn fortojn en la tuta lando, aktivigas la lokajn societojn kaj la esperantistan aktivularon, ĝi plialtigas la nivelon de la organiza kaj propaganda agado de nia tuta movado.

Eksterlandaj Esperanto-societoj kaj unuopaj gesamideanoj povas helpi, demandante de ni aron da glumarkoj-brikoj po 250 en kajero, kiuj kostas 250 levoj, por vendi ilin kaj la sumon transpagi, ĉu per UEA je konto de Bulgara esperantista asocio, ĉu sendante al ni Esperanto-eldonaĵojn, se pro valutaj kaŭzoj la sumo estas netranspagebla per UEA.

Ni pruvu nian entuziasmon kaj nian idealismon, karaj samideanoj, efektivigonte nian noblan grandan entreprenon!

Ni konstruos propran Esperanto-domon en Sofio!

G. Dolapčiev

Esperantistoj-batalantoj

Pro Esperanto en la malliberejo

Ĥristo Kamburov naskiĝis la 10-an de julio 1914 en vilaĝo Mihalci, distrikto de Târnovo, en malriĉa vilaĝana familio. En 1933 li estis lernanto en urbo Varna, kie li partoprenis en la lernanta striko. La polico trovis ĉe li malpermesitan marksisman literaturon kaj li estis forigita de la gimnazio. En 1934 li eklaboris en la ŝiplaborejo «Ĉerno more» (Nigra maro). Tie li partoprenis ĉe la kreo de partia kaj komsomola grupoj. En la sama jaro li estis membro de la distrikta komitato de la Bulgara komunista partio en Varna. Li diligente lernis Esperanton kaj post kelka tempo Ĥristo Kamburov fariĝis sekretario de la distrikta komitato de la eksterleĝa Bulgara laborista esperantista asocio. En decembro 1934 oni faris denuncon en la laborista esperantista organizaĵo kaj li kune kun aliaj esperantistoj estis arestitaj kaj kruele torturitaj en la policejo. Post kelksemajna policesplorado oni sendis ilin en la malliberejon de urbo Varna, post tio en Sliven, kie Ĥristo pasigis 3 jarojn.

En 1937 Kamburov estis liberigita. Li fariĝis havenlaboristo, poste seruristo en la ŝipkonstrua fabriko, kie li kreis eksterleĝan partian grupon. En la sama tempo li partoprenis en la esperantista societo «Albatro» en urbo Varna kaj en komunista aktivulara grupo kun sekretario Violin Oljanov al la sama societo.

En 1940 Kamburov revenis en sian naskiĝvilaĝon, kie li kune kun I. Ĥristov kaj G. Goranov kreis partian organizaĵon, kiu aktive



laboris ĝis 9.IX.1944, helpante la partizanan taĉmenton per nutraĵo kaj loĝejoj.

La 1-an de julio 1944 oni faris denuncon — oni kaptis novaliĝintan partizanon, kun kiu havis kontakton Kamburov. Tial Ĥristo Kam-

burov kune kun sia edzino Roza Kamburova estis devigitaj fariĝi eksterleĝuloj — ili fariĝis partizanoj. Li kaj la partizanoj el la vilaĝoj Miĥalci, Vârbovka kaj Dâskot kreis partizanan grupon, kies politika komisaro estis Ĥristo Kamburov (Bojan). La partizana taĉmento faris kelkajn grandajn operaciojn. Ĝi al militis je la 9-a de septembro 1944 la vilaĝojn Emen, Malkoĉevo, Kereka, unu elektrocentralon k. a. Post la 9-a de septembro 1944 kiel membro de la estraro de la regiona komitato de la Bulgara komunista partio kaj prezidanto de la regiona sindikata konsilantaro malgraŭ sia serioza malsaneco Ĥristo Kamburov fordonis ĉiujn siajn for-

tojn por la plifirmigo de la popola regado. Ĉiam helpema, fidela al sia partio, neimageble honesta Ĥristo Kamburov estis ekzemplo de kuraĝa batalanto por la afero de la Bulgara komunista partio. La serioza malsano tamen, kiu trafis lin jam en la malliberejo kaj disvolviĝis en la partizana taĉmento en unu belega tago de aŭgusto 1948 ĉesigis la vivon de la fidela batalanto de la partio kaj de la popolo. Ni memoros eterne lin, la partizanon kaj politikan malliberulon, la entuziasman Esperanto-pioniron Ĥristo Kamburov. Nun la strato, kie li loĝis en Târnovo portas lian karan nomon.

I. S.

La mondpaca esperantista movado (MEM)

La dua tutmonda milito same kiel la unua ĉesigis la disvolvon de la Esperanto-movado en la tuta mondo. En la unuaj 10 jaroj post la milito la Esperanto-movado travivis stagnan periodon en ĉiuj landoj. Ankaŭ en nia lando estis jaroj kiam la esperantistaro ĉesis labori organizite serĉante novajn vojojn kaj manierojn por la Esperanto-laboro en la kondiĉoj de nova socialisma Bulgario. Post la konferenco en Plovdiv 1955 tamen ĝi ekmarŝis firme kaj en daŭro nur de kelkaj jaroj atingis grandajn sukcesojn. La esperantistaro ĉe ni senĉese plimultiĝas, estas Esperanto-societoj en preskaŭ ĉiuj urboj kaj en multaj vilaĝoj, ni povas fieri pri la eldonado de belegaj revuoj «Nuntempa Bulgario» kaj «Bulgara esperantisto», ĉiudimanĉaj radioelsendoj ktp.

Multaj bulgaraj esperantistoj laboras ankaŭ en la kadro de Mondpaca esperantista movado (MEM), kiu en daŭro de kelkaj jaroj unuigis multajn progresemajn esperantistojn el la tuta mondo en la batalo por paco. Dank' al la sindona laboro de kamaradoj el multaj landoj MEM fariĝis grava faktoro en nia Esperanto-movado. Sur la bazo de MEM renovigis sian laboron la Esperanto-asocioj de ĉiuj socialismaj landoj kaj trans la maroj kaj montaroj traflugas denove centoj da entuziasmaj leteroj kaj dekoj da belegaj revuoj kiel «Nuntempa Bulgario», «El popola Ĉinio», «Vietnamio antaŭenmarŝas». Laŭdinda estas la entuziasma laboro de la kamaradoj A. Balag (Balague) en Aŭstrio, K. Kvist en Svedio, s-ino F. Parej (Paraige) en Londono, Schödl en Orienta Germanio, P. Balkani en Hungario, R. Burda en Ĉeĥoslovakio kaj multaj aliaj.

La unua konferenco de MEM (1953) estis organizita en tre modesta formo. Tie oni decidis eldoni revuon «Paco» kiel organo de MEM. Poste pasis kelkaj jaroj en streĉa laboro, nur perletera kontaktiĝo de la gvidantoj de MEM, sed seninterrompa eldonado de «Paco», kiu sukcese unuigis la fortojn de la esperantistoj-pacbatalantoj.

La dua konferenco de MEM okazis en la kadro de la 44-a jubilea kongreso de UEA en Varsovio. Post 5-6 jaroj da laboro renkontiĝis la esperantistoj-pacbatalantoj por pridiskuti la ĝis nun plenumitan laboron kaj marki la vojon por la novaj taskoj konekse kun la kreskanta tutmonda batalo por paco. Laŭ decido de CK de BEA delegitoj el Bulgario al la MEM-konferenco estis N. Pârvanov el Kolarovgrad, membro de landa pac-komitato kaj CK de BEA kaj T. Lakova el Sofio, membro de CK de BEA.

En Varsovio tamen evidentiĝis ke aliaj aranĝoj kaptis la atenton de la kongresanoj. La unuan kunsidon de MEM-konferenco vizitis 150 personoj kaj la sekvantajn kvar — po 50-60 personoj precipe delegitoj speciale por la MEM konferenco: el Svedio, Aŭstralio, Vietnamio, Hindonezio, Ĉinio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Orienta kaj Okcidenta Germanio kaj aliaj.

Gravan eraron faris la estraro de la konferenco plilongigante ĝin ne necese — preskaŭ paralele kun la kongresaj kunsidoj kaj tiumaniere fuŝante la komencan sukceson.

Post la salutoj pro foresto de la prezidanto de MEM R. Burda legis la raporton la ĝenerala sekretario de MEM A. Balag el Aŭs-

trio. Li detale priskribis kiel la estraro laboris en daŭro de 6 jaroj, li menciis vicon da malhelpaĵoj kaj malfacilaĵoj renkontitaj de la estraranoj, kiuj kontaktiĝis kaj konsiliĝis nur per letere, sed malgraŭ ĉio estis atingitaj bonaj sukcesoj. En la raporto estis forte substrekite ke MEM subtenas la decidojn de la Tutmonda konsilantaro de la paco, disvastigas kaj propagandas ilin inter la esperantistaro kaj neesperantistaro.

En la kvara kunsido de la konferenco estis elektita nova estraro de MEM. Ambaŭ bulgaraj delegitoj estis elektitaj kiel membroj de la nova estraro: N. Pârvanov — unu el la vicprezidantoj kaj membro de la komisiono pri eksteraj rilatoj, kaj T. Lakova — MEM-peranto por Bulgario kaj gvidanto de la virina komisiono.

Fine la konferenco akceptis rezolucion kaj sendis telegramojn al Ĝenevo, kie kunsidis la ministroj de la eksteraj aferoj de la kvar grandaj landoj. La rezolucio estis presita en la 10-a numero de BE.

La dua konferenco de MEM havis kaj havos pozitivan rolon por altiro de pluraj gesperantistoj al aktiva batalo por paco en la tuta mondo.

En nia lando, kie la paco estas defendata per leĝo voĉdonita en nia Parlamento kiu punigas la propagandantojn de milito, la esperantistoj ankaŭ povas kaj devas kontribui

tiun grandegan strebado por konservo de la paco ĉe ni kaj en la tuta mondo.

Estas necese ke ni kreu pli intimajn rilatojn kun la komitatoj por paco en urboj kaj vilaĝoj kaj kune eklaboru efektivigante niajn celojn. Estas necese ke CK de BEA subtenu konstantajn kontaktojn kun la Nacia pac-konsilantaro. Ni devas utiligi ĉiujn internaciajn festojn kaj iniciatojn kaj sendi kolektivajn aŭ individuajn salutleterojn kaj per ili krei konstantajn ligojn kun amikaj rondoj el ĉiuj landoj de la mondo. Estas necese ankaŭ ke ni plimultigu la abonantojn al «Paco» en Bulgario, kiu kontaktigos nin kun la plej progresemaj esperantistoj en la tuta mondo kaj ni devas sendadi ĉiam al «Paco» interesajn materialojn konekse kun nia pacbatalo.

La bulgaraj esperantistoj dum la kongreso en Varsovio havis okazon renkontiĝi kun amikoj de nia lando el diversaj ŝtatoj de la mondo. Ni aŭdis ĝojigajn entuziasmajn eldirojn pri nia lando, pri nia popolo, pri nia belega revuo «Nuntempa Bulgario», sed ni komprenis ankaŭ ke multaj esperantistoj ne konas nin bone.

Do, por la paco, por la prospero de nia lando, por la plifirmigo de niaj sukcesoj en la konstruado de la socialismo, ni, la esperantistoj streĉu la fortojn por perfekte el-lerni Esperanton kaj racie utiligi ĝin.

Tinka Lakova

LINGVA KONSILEJO

Necesa precizigo de kelkaj ofte uzataj fakvortoj

La moderna lingvaĵo de l' nuntempaj enlandaj Esperanto-revuoj ofte enhavas multe da fakvortoj kaj specialaj esprimoj, per kiuj oni interpretas variajn informojn pri nia ekonomia, socia, politika kaj kultura vivo. Multaj el tiuj ĉi esperantlingvaj interpretoj estas trafaj kaj ĝustaj. Tamen ofte aperas ankaŭ vere malbonaj kaj eĉ erarigaj vorttradukoj, kiuj ŝanĝas kaj alisencigas la signifon de la originalaj bulgaraj fakvortoj kaj specialaj nocioj.

La faksciencan precizecon de la lingvaĵo de niaj Esperanto-publikaĵoj ni konsideras necesa kaj unua lingva premiso. Kaj ne nur el vidpunkto lingvosciencia. Por eviti miskomprenojn kaj por doni adekvatan tradukon oni devas uzi nur la koncernajn specialigitajn kaj ĝustajn fakvortojn, kiuj interpretas adekvate kaj precize la nacilingvajn nociojn.

Jen estas kelkaj ekzemploj de tre ofte uzataj mistrafaj interpretoj de fakvortoj:

1. TKZS (Trudovo-kooperativno zemedelsko stopanstvo) tekstas laŭvorte en Esperanto: labor-kooperativa terkultura mastrumo. Tamen la laŭvorta Esperanto-traduko ŝajnas tre longa, tro detala kaj eble nesufiĉe klare interpretas la signifon de tiu ĉi bulgara formo de agrikultura kooperativismo. El tio sekvis la plej diversaj variantoj de ĝia esperantigo kiel: **kamparmastruma laborkooperativo, mastruma kooperativo, laborkooperativa agrikultura mastrumo, labora kamparmastruma kooperativo, kooperativa kampmastrumo, terkultura laborkooperativo, ktp.** (Ĉio en «Nuntempa Bulgario»).

En la suplemento de PV (1954) ni trovas la vortformojn: **vilaĝmastruma kolektivo** sed ĝi ankaŭ neplene taŭgas por precize interpreti la bulgaran terminon.

Do, la plej trafa esperantigo de TKZS laŭ ni devus esti: terkultura (agrikultura) kooperativo. La revuo «El popola Ĉinio» jam uzas plej ofte la formon «agrikultura kooperativo».

2. JAZOVIR. Tiu ĉi bulgara kunmetaĵo konsistas etimologie el du vortradikoj: **jaz** — kiu signifas «baraĵo» kaj **vir** — rivera akvo-profundejo, riverlago. Kiel teknika termino «jazovir» havas klare difinitan signifon: lago artefarite estigita malantaŭ baramurego (valbarilo) en rivera valo. Sed oni tradukas ĝin plej diversmaniere, komencante per la tute erarigaj **digo**, **diglago**, **baraĵo**.

La interpreto per «digo» estas plej maltrafa kaj erariga, ĉar «digo» laŭ PV signifas: remparo starigita por ŝirmi kontraŭ inundo de rivero aŭ maro. Kiom ajn nesufiĉa estos tiu ĉi ĝenerallingva difino (digo estas laŭlonge de la bordo de rivero aŭ de maro starigita barilo, dum baraĵo — transverse de la rivero), tamen ĝi pli ol sufiĉe montras ke nenio komuna ekzistas inter la Esperanta vorto «digo» kaj la bulgara nacia «jazovir».

Kaj kiel strange sonas la vortoj, ekz. **ba-**

raĵo «Beglik» aŭ baraĵo «Studen kladenec» aŭ niaj baraĵoj sub bildoj pri lagoj, artefaritaj lagoj en niaj konataj rivervaloj montaj!

Poste la tradukado provis la formon **lago de baraĵo** por fine atingi la ĝustan kaj adekvatan interpreton — **baraĵlago**.

Sekve oni devas ĉiam uzi nur la bonan kaj precizan fakvorton «**baraĵlago**», kiu eĉ povus esti mallongigata en «**barlago**».

3. OKRĀG. Tre ordinara kaj ĉiutaga administra nocio, kiu bedaŭrinde estas tradukata malsame kaj erarige, jen: **departemento**, **regiono**.

Sed rapida konsultado en PV evidentigas al ni, ke «departemento» estas: 1. Sekcio en ministrejo kaj 2. Franca administra distriktaro, estrata de prefekto, dum «regiono» signifas: 1. Parto de lando aŭ de la spaco karakterizata de specialaj ecoj (monta, apudmara, pariza regiono), 2. Parto de organika korpo... kaj 3. Sfero, kampo de efiko...

La preciza traduko de «okrāg» estas **distrikto** (precize limita teritorio havanta apartan administran unuecon, laŭ PV). Iuj bulgaroj uzas «distrikto».

Stefan Masárov

PRI LA KOREKTA UZO DE „DA“

Ne estas necese ankaŭ ĉi tie ekspliki komplete la regulon pri la uzo de la prepozicio **da**. Grave estas, ke la praktiko prezentas okazojn de malkorekta uzo, kiu estas ŝuldata, laŭ mia opinio, al la fakto, ke oni forgesas la esencan kondiĉon, kiu premisas la uzon de **da**; kaj tiu nepra kondiĉo estas la **elemento de kvanto**.

Estas vere, ke estas kazoj, ĉe kiuj oni hezitas, ĉu uzi **da** aŭ **de**. Por tiaj kazoj mi kuraĝas doni praktikan regulon. Do, se la vorto post kiu devus esti **da** aŭ **de**, estas logike akcentita, t. e. havanta la logikan akcenton de la vortgrupo, oni jam havas la fundamentan premison por uzi **da**. Kaj inverse, se tiu vorto ne estas logike akcentita, do ne temas pri kvanto, sed pri speco difinta de la vorto, kiu sekvas la prepozicion, oni ne devas uzi **da**, sed **de**.

Ekzemplo. En «Nuntempa Bulgario» n-ro 2, 1959, p. 33, kol. 2, linioj 18–19 demalsupre, estas dirite: «Tie — sur la nuda lo-

ko — montriĝis de tempo al tempo malgrandaj vicoj **da** fosistoj». **Da**, laŭ mia opinio, estas neĝustloka, ĉar oni ne celas emfazi la kvanton de l'fosistoj, sed nur indiki la konsiston de la vicoj al kiu celo servas la prepozicio **de**, t. e. . . vicoj **de** fosistoj.

Oni, tamen, devus diri ekzemple: Mi atendas la alvenon de du-tri fosistoj, sed mi estis surprizita vidi la alvenon de vicoj **da** fosistoj.

Alia ekzemplo, prenita el la antaŭparolo de «Bofilino», p. 1, linio 8 desupre: «Samtempe li estas la plej eminenta reprezentanto de la nova generacio **da** bulgaraj verkistoj, kiuj. . .»

Ĉu estas necesa **da**? — Ĉi tie temas pri tio, ke la koncernaj bulgaraj verkistoj estas de (el) la nova generacio ktp.

Oni, tamen, devus diri, ekzemple: Tuta generacio **da** verkistoj troviĝis sub lia forta influo.

Il. Petrov

REZULTOJ DE LA KONKURSO PRI PLEJ BONAJ KORESPONDANTOJ 1959

La redakcio de «Bulgara esperantisto» anoncis en la unua n-ro de la pasinta jaro konkurson pri plej bonaj korespondantoj. Tio instigis multajn samideanojn kunlabori regule al nia gazeto. Iuj el ili konfirmiĝis kiel bonaj ĵurnalistoj. Inter ili la redakta komitato pritaksis tri samideanojn

PLEJ BONAJ KORESPONDANTOJ DUM 1959

Atanas Gaev — Asenovgrad

Delka Ĉolakova — Sofio

Hristo Manolov — Polski Trambeŝ

Al ili la redakcio donas kiel premion la libron «Sub la jugo» de Ivan Vazov en Esperanto. Gratulon!

Krome, la redakcio decidis publikigi la nomojn de dek regulaj kaj bonaj korespondantoj:

Stanka Ĉukolova — Samokov

Irina Ĉukova — Starā Zagora

Hristo Dimitrov — Kubrat

Jordan Dimitrov — Ruse

Ivan Dobrovski — Stanke Dimitrov

Konstantin Genĉev — Pazarĝik

Stefan Kadiev — Sofio

Nikola Najdenov — Târnovo

Andrej Pânĉev — Kazanlâk

Georgi Simeonov — Vidin

La redakta komitato dankas al ili pri ilia regula kunlaborado kaj deziras, ke dum la nova jaro ili ankaŭ estu sur sia korespondanta posteno. Per sia laboro ili instigu al laboro la aktivulojn, per sia kritiko korektigu la erarojn.

La redakta komitato ankaŭ konstatis, ke multaj societoj ankoraŭ ne havas korespondantojn. Pro tio ni ne povas respeguli ilian agadon, ni ne povas utiligi tutplene la metodon de interŝanĝo de sperto. Krome, la ricevataj korespondadoj estas en la plimulto da okazoj nur konstataj, sed ne analizaj. Kritikajn korespondadojn ni preskaŭ ne ricevas, escepte de Gaev (Asenovgrad). Ni esperas, ke dum la nova jaro niaj korespondantoj plibonigos sian kunlaboradon.

P R I S. A. T.

S-ano J. T. petis informon pri Sennacieca asocio tutmonda (SAT). Li deziras scii ankaŭ, kia devas esti nia sinteno al ĝi.

Pro tio, ke eble ankaŭ aliaj esperantistoj, nekonante bone la ideologian fizionomion kaj la agadon de SAT, montras intereson al ĝi, ni respondas al la demandinto en la paĝoj de nia organo.

Sennacieca asocio tutmonda estis fondita en 1921 kiel laborista esperantista organizaĵo. Siatempo ĝi sukcesis organizi la plimulton de la laborista esperantistaro en preskaŭ ĉiuj landoj, inkluzive Sovet-Unio. Ĝi eldonis konsiderindan kvanton da valoraj progresemaĵoj libroj.

Tamen iom post iom en la estraron de SAT eniris personoj, kiuj komencis gvidi la organizaĵon sur la vojo de batalo kontraŭ la socialismo kaj la komunismo, kontraŭ la movado de la popoloj por defendo de la paco, kontraŭ la socialismaj landoj. Sur la paĝoj de la SAT-eldonaĵoj oni komencis kampanjon kontraŭ la internacia proleta movado, kontraŭ la nacilibera batalo de la

koloniaj landoj, kontraŭ la memstareco de la nacioj, kontraŭ la naciaj lingvoj. Fakte SAT fariĝis instrumento de la kosmopolita ideologio de la burĝa klaso. Pro tio la membraro de SAT konstante malkreskas. La laboristoj esperantistoj iom post iom vidas la veran fizionomion de SAT kaj forlasas ĝin.

En Bulgario SAT-anoj estas nur kelkaj personoj. Parto da ili ne konas bone, kia organizaĵo estas SAT kaj kies interesojn ĝi fakte defendas. La ceteraj estas kontraŭuloj de la popoldemokratia reĝimo.

La Centra komitato de BEA ne havas rilatojn kun SAT. Kontraŭ la senĉecaj kalumnioj presataj en gazeto «Sennaciulo» kaj «Sennacieca revuo» rilate al la popoldemokratiaj landoj kaj Sovet-Unio lastatempe fakte defendas. La ceteraj estas kontraŭlantaro, germanaj, sovetaĵ kaj aliaj esperantistoj.

En «Esperanto» de UEA, n-ro 9, 1959 estas presita respondo de la Estraro de UEA rilate al la propono de la SAT-estraro pri deklaracio de SAT. Bulgara esperantista asocio subtenas la respondon de UEA.

ESPERANTAJ NOMOJ EN BULGARIO

Dum la Zamenhofa jaro multaj societoj en nia lando sukcesis alproprigi esperantaj nomojn al stratoj, placoj, aŭtobushaltejoj, parkoj k. a. Malgraŭ ke la jubilea jaro jam forpasis ni ne devas demobilizi nin en tiu rilato. La esperantaj nomoj en urboj kaj vilaĝoj estas konstanta propagandilo de nia afero. Ek de tiu ĉi numero ni komencas publikigi ilin kaj ni esperas, ke ni regule ricevados informojn por tiu nova rubriko. Jen la nomoj akiritaj ĝis nun:

- | | |
|---|--|
| 1. Orjaĥovo — insulo «Esperanto» (sur Danubo) | 7. Kubrat — placo «L. Zamenhof» |
| 2. Sofio — stratoj «Esperanto» kaj «Zamenhof» | 8. Asenovgrad — placo «Esperanto» |
| 3. Varna — strato «Zamenhof», aŭtobushaltejo «Esperanto» | 9. Stara Zagora — strato «Ludoviko Zamenhof», aŭtobushaltejo «Esperanto» |
| 4. Jambol — strato «Esperanto» | 10. Sevlievo — strato «D-ro L. Zamenhof» |
| 5. Polski Trâmbeŝ — parko «Esperanto» | 11. Bankja — strato «Esperanto» |
| 6. Kazanlâk — strato «Esperanto», aŭtobushaltejo «Esperanto», dolĉaĵejo «Esperanto» | 12. Ĥaskovo — strato «Esperanto» |
| | 13. Pleven — strato «Esperanto» |
| | 14. Plovdiv — strato «D-ro L. L. Zamenhof» |

BIBLIOGRAFIO

Esperanto N-ro 12, decembro 1959, dediĉita al la centa datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

Heroldo de Esperanto, N-ro 16, 16 novembro 1959.

The Worker esperantist, N-ro 120, oktobro 1959.

New Zealand esperantist, N-ro 120/121, julio-aŭgusto 1959.

Laborista esperantisto, N-ro 11, novembro 1959.

Informilo de Internacia Esperanto-muzeo en Vieno, 1959.

De Esperantist (nederlandlingva), N-ro 5, decembro 1959.

Dansk Esperanto-Blad, N-ro 12, decembro 1959.

Edukado internacia, N-ro 36, 15 oktobro, 1959. (Antaŭe: Instruista letero), oficiala organo de internacia ligo de esperantistaj instruistoj.

El popola Ĉinio, N-ro 5, 1959. Ĝi entenas tre interesajn artikolojn, ekz.: Plenumo de kvinjara plano en du jaroj. Nova etapo de la virina movado en Ĉinio, k. a. En la rubriko «Sur nia librobreto» aperis recenzo de Honfan pri «Bofilino»

La Libera Esperantisto, organo de la Libera Esperanto-asocio por Germanio, N-ro 119, aŭgusto-septembro 1959.

Norda prismo, N-ro 4, 1959.

EN LA NOVA JARO

Ke estu bona por homaro,
la nun veninta nova jaro,
ke malpliigu ĝi ĝis nulo
danĝeron de tutmonda brulo,
ke de atommilit' minaco
jam cedu al eterna paco

inter popoloj katenitaj
per unuiĝoj pormilitaj,

ke de naturmisteroj kono
utilu nur al homa bono,

ke rabsistemo kolonia
foriĝu de planedo nia,

kaj sur afrika kontinento
ekregu paco kaj konsento,

ke tia bela efektivo
al nia venu tera vivo —

necesas granda paclaboro
en ĉiu tago, ĉiu horo,

necesas pacdefenda kreo
de tuta granda Pacarmeo,

en kiu ni, esperantistoj,
ja ankaŭ estas militistoj!

Do post novjara festa horo
senlace ĉiuj al laboro!

George Deŝkin

JUGOSLAVIO

Vladan Vučićević (18-jara), s. Radmilović, ZP; Toponica kod Kragujevac — kun ĉl, PI, E-gaz., Iernolibroj.

USSR

E-rondo — kun ĉl, pri ĉt. Adreso: Uz. TPEP, poŝtkesto 8, Taŝkent.

K-do Sulsenberg Ilmar (studento, 19-jara), Ülikooli 18-a, Tartu, Estona SSR — kun ĉl, interŝ. PI, PM kaj gaz.

La gefratoj: Nana Taodidiŝvili (17-jara) kaj Maguli Taodidiŝvili (14-jara), ul. Al. Ĉavĉavadze 7, Tbilisi — kun gejunuloj el Francio, Germanio, Britlando, Argentino, Brazilo, Italio, Greklando, Kamboĝo kaj Hispanio; pri arto kaj sporto; interŝ. PI de floroj, artistoj.

Junaj gefratoj Aino kaj Edgar Viigimae, str. Makarovi 13-4, Tallinn, Estona SSR — kun ĉl per PI.

Ludoviko Zebrauskas, Lokomotivejo, Pa-nevezys, Litova SSR — kun fervojistoj.

Vasilij Klimkov (studento de Agrikultura akademio), str. Viljamska 30, kv. 161, Gorkij, Mogileva provinco, BSSR — pri ŝako, gaz., internacia lingvo, arto.

Stepanov P. S. (studento de Politeknika instituto), Arzamasskoje ŝosse Studento-domo 1, Gorkij 22 — pri studenta vivo, fotografio; interŝ. gaz., muziknotojn.

Kaliniĉenko Ludmila (studentino, 20-jara), str. Mejigorskaja 11/5, Kiev 71, USSR — pri studenta vivo, interŝ. gaz., muziknotojn.

Valentina Brigidina (studentino 21-jara), Ĉerniŝevskaja 46, kv. 4, Ĥarkov, Ukrainio — pri pentrarto.

Alfredas Otos, Poŝto Voiĉoiĉiai, Sedos rajonas, Litova SSR — kun junuloj el ĉl pri lernejo; interŝ. P, PM, gaz.

Natalia Krutjakova (studentino, 20-jara), Petrovskogo 26, kv. 19, Ĥarkov 24, Ukrainio — kun ĉl pri muziko.

Eha Nepp (mezlernantino), Faani, Torna, Estona SSR — kun gelernantoj kaj gejunuloj el ĉl; interŝ. PM, PI, alumetetiketojn.

Uno Nepp (fervora filatelisto), Faani 3, Torna, Estona SSR — kun filatelistoj en ĉl, pri ĉt; interŝ. PM, unuataĝajn kovertojn, PI.

Kriseev V. (studento, 21-jara), ul. Minina 16/55, kv. 1, Gorkij, kun ĉl, pri ĉt.

Lenbit Tangsoo (sperta esperantisto), Männiku 14, Torna, Estona SSR — kun ĉl, pri ĉt; interŝ. PM, unuataĝkovertojn, PI, monerojn, papermonon, librojn kaj E-ajojn.

Rein Saag, Tilsu, Laheda, Polva raj., Estona SSR — kun ĉl, pri ĉt, interŝ. PI, PM.

Rein Randoja (19-jara), str. Kalevi 13, Tartu, Estona SSR — kun ĉl, interŝ. PI, PM.

K-do Fiŝbejn Lev G. (inĝeniero), ulica Pervaja Daĉnaja 42, kv. 9, Uzlovaja, Tulsokj obl. — kun amikoj de Sovetio el ĉl pri seriozaj temoj, per L, PI.

K-do Arne Friedenthal (25-jara, fraŭlo), Mustla Linnanaigla, Viljandi rajon, Estona SSR, kun ĉl, interŝ. PI, PM, gaz., notojn de amuza muziko.

Uno Abel, El. Vilde 10-1, Tartu, Estona SSR — kun ĉl, pri ĉt, interŝ. PM, PI, gaz.

Vladimir Smoljaninov (muzikisto-violonĉelisto), ul. Svoboda 53, Voronej 6 — interŝ. muziknotojn.

Leonid Rakitjanskij (oficisto, 22-jara), ul. Betonsĉikov 5-3, Kaunas 14, Litova SSR — kun ĉl per PI.

Kvar estonoj: 1) Erki Loigom (15-jara), Kirsi str. 28, Tallinn 9, Estona SSR; 2) Elmar-Ardi Ingre (17-jara), Kirsi str. 30, Tallinn 9, Estona SSR; 3) la fratoj Mait Liivik (14-jara) kaj Peep Liivik (11-jara), Kirsi str. 22, Tallinn 9, Estona SSR; 4) Vello Raud (14-jara), Kirsi str. 25, Tallinn 9, Estona SSR — interŝ. PM, PI, alumetetiketojn.

Eduard Oinus (studento-filologo, 29-jara), Tiigi 78, Tartu, Estona SSR — pri ĉt, interŝ. PM, gaz., librojn.

Viktor Savickij (ĝardenisto), ul. Sverdlova 60, kv. 2, Ufa 25 — dez. havigi semojn de raraj kreskaĵoj kaj floroj kontraŭ sovetaĵ PM.

E-rondeto, Pedagogia instituto, Mendelevskaja 7, Tula — kun ĉl per PI kaj L.

Urmas Rätsep, Taime 12-7, Tallinn, Estona SSR — pri arto, literaturo kaj historio de orientlandoj; interŝ. PI.

Aino Piiper (instruistino, 31-jara), Kesk-kool, Rapla, Estona SSR — kun ĉl, pri literaturo, historio, lingvoj kaj fotografio.

Uno Ruuval, Roo 8-12a, Tallinn, Estona SSR — bezonas propagand-materialojn pri E.

Liĉ Anatolij (19-jara), poŝtkesto 63, ĉefpoŝto, Saratov — pri ĝazmuziko, interŝ. PI, fotojn, gaz.

Najdin V., Paŝkovka Krasnaja 105, Krasnodar 27 — pri agrikulturo de vinberoj, interŝ. PI kun ĉl.

S-ano Romualdas Malakauskas, str. Gogolio 3-11, Klaipėda, Litova SSR — pri turismo, popolaj dancoj; interŝ. PI.

Gintas Brukas (20-jara), Vilkaviškio g-ve n-ro 4, Kapsukas, Litova SSR — kun gejunuloj el ĉl, pri ĉt, interŝ. PI, PM.

Kusta Kruus, Kohtla-Jäärve, mnt 7-4, Kohtla-Nomme, Estona SSR — kun ĉl, interŝ. PM, PI, P, gaz. kaj muziknotojn.

S-ano Akgirdas Pateckas, str. Gogolio 3-3, Klaipėda, Litova SSR — pri turismo, literaturo, fotografio kun ĉl.

Kupre Astrida (studentino de historio), Gorkija 69-506, Riga, Litova SSR — kun gejunuloj pri ĉt, interŝ. PM, PI.

Vladimir Lasnij, ul. Mira 12, kv. 8, N. Miŝi, Moskovskaja obl. — interŝ. PM.

Isakov Georgo (18-jara), ul. Primorska 45, Odesa — kun junuloj el ĉl, pri ĉt.

A. Milbergs (18-jara), Tukuma 20-1, Ventspils, Latva SSR — kun gejunuloj el ĉl, pri ĉt, interŝ. PI, PM, fotojn kaj librojn.

J. Aurins (17-jara), Komjaunatnes 101-1, Ventspis, Latva SSR — kun gejunuloj el ĉl, pri ĉt, interŝ. PI, PM, fotojn kaj librojn.

Estonio, Tallinn, Salme 46-16 — Ellen Nurk — 24-jaraĝa studentino kun gejunuloj.

Moldavio, Kiŝinev, Stefana velikogo 134 — Levenzon Mendel — 25-jaraĝa inĝenieromekanikisto.

Litovio, Miniĵos 2, LLPI, Klaipėda — Andrus Bielskis — juna inĝeniero.

VIETNAMIO

Nguyen — Dô-Khanh Cuc Dô-thi Bô kien — truci Hanoi — pri E-movado, sendu afiŝojn, E-glumarkojn.

Nguyen — tuân, PK, PM; 98 Nguyễn — Du Hanoi.

POLLANDO

Gdynia, ul. Harcerska 15/11 — Bierkacki Zygmunt.

Gdynia, ul. Svietojanska 139/137, Walaszek Maria.

Gdynia, ul. Warynskiego 6, SRD Zdzislaw.

Gdynia, ul. Portova 11/1, Zelmansk Zygmunt.

Gdynia, KMO. Portova 13, Kmiccik Wladyslaw.

Gdynia, 1. skv. pocr. 292, Antonio Zalucki — kun milicanoj kaj oficistoj de milicianaj oficejoj.

BULGARIO

Dimitrovo-iztok, str. Klement Gotvald 6/3, Metodi Miĥajlov — interŝ. PM, IK.

ESPERANTISTA ADRESARO

BEA preparos adresaron de la esperantistoj en Bulgario. Konekse kun tio, ni petas ĉiujn societojn sendi liston de ĉiuj siaj membroj. La adresojn ordigu laŭalfabete de la propraj nomoj. Aparte donu la adresojn de tiuj, kiuj ankoraŭ ne membras.

La geesperantistoj de loĝlokoj, kie ne estas societoj sendu ankaŭ siajn adresojn.

Gesamideanoj, havigu reklamojn al «Bulgara esperantisto»!

Ne ĉesigu la kampanjon por varbado de novaj abonantoj!

LIBROJ EN ESPERANTO

«**Sub la jugo**» — romano de Ivan Vazov
priskribas la batalon de la bulgara popolo
kontraŭ la kvincentjara turka jugo, 464 p.,
bindita 17.30 levoj

Interesa kaj emociiga verko.

«**Bofilino**» — romano de Georgi Karaslavov, 328 p., bindita 13.28 „

«**Bulgario**» — geografiaj, historiaj kaj
ekonomiaj skizoj; 284 paĝoj, tole bindita 13.15 „

Lernolibro de Esperanto de Asen Grigorov (stencilita) 3 „

Bulgara-Esperanta vortaro de Asen Grigorov 3.40 „

Esperanto-Bulgara vortaro de Asen Grigorov 3 „

Liveras Bulgara Esperanto-kooperativo, Sofio, bulv.
Stalin 40, kaj ĝiaj magazenoj en Sofio.

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

abonigas al jenaj gazetoj:

«**Bulgara esperantisto**» 14 levoj

por eksterlando 16 levoj

«**Paco**» 12 levoj

«**El popola Ĉinio**» — dumonata 10 levoj

«**Vietnamio antaŭen marŝas**» — trimonata 8 levoj

La asocio abonigas al eksterlandaj gazetoj nur la abonantojn de «Bulgara esperantisto».

BEA eldonis MEMBROKARTON. Ĝi estas tuj sendota kontraŭ unu levo al la societoj kaj al la individuaj membroj, pagintaj sian membrokotizon almenaŭ por la unua trimonato 1960. Oni devas ankaŭ sciigi la ĝustan nomon de la posedonto kaj ek de kiu jaro estas membro de la asocio.

TUJ MENDU LA MEMBROKARTON!

